Heinrich Heine,

Al vi diamantoj kaj perlo

tradukita de Leopold Blumental

Al vi diamnntoj kaj perloj -
Kaj ĉio al via inklin' ....
Vi havas plej belajn okulojn -
Plu kion deziri, knabin'?

Pri viaj plej belaj okuloj,
Laŭ volo de l' Muzo-estrin',
Mi kreis la kantojn eternajn -
Plu kion deziri, knabin'?

Per tiuj plej belaj okuloj
Kruele turmentis vi min
Kaj min vi detruis ĝisfunde -
Plu kion vi volas, knabin'?

Traduko de la Germana poemo "Du hast Diamanten und Perlen" de Heinrich Heine *(∗1797-12-13 – †1856-02-17) en Esperanton de* Leopold Blumental *(Leo Belmont, ∗1865-03-08 – †1941-10-19).*

Arg-836-1683 (2013-02-22 16:24:31)

La trsduko troviĝas en la dana Esperanto-revuo "Dansk Esperanto Tidende" el la jaro 1942. Pri la tradukinto vidu la retejon `http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont`.